

BOLETIM INFORMATIVO DA
ASSOCIAÇÃO PORTUGUESA
DE ESPERANTO

NIA BULTENO



INFORMA BULTENO DE
PORTUGALA ESPERANTO ASOCIO

Rua Dr. João Couto, 6 r/c. - A Tel: 74 13 59 LISBOA 4

1977

SEPTEMBRO — OKTOBRO

Nº 16

LA HUMANECA KONSISTO DE NIA LINGVO

Prelego de Adolfo Nunes
okaze de la V-a Renkontigo
en Caldas da Rainha je la
26-a de Junio 1977.

Okaze de la V Renkontigo de Portugalaj Esperantistoj, je la nomo de PEA mi esprimas nian ĝojon ĉeesti en la gastiganta Caldas da Rainha.

Al la loĝantaro de tiu ĉi urbo, kies jubilea ora festo ĉi-jare estas celebrata, la signojn de nia kontenteco. Kaj al la afabla estraro de CASA DA CULTURA, kiu hodiaŭ nin akceptas, kun elkoraj salutoj, nian ŝuldsenton pro la volonta permeso efektiviĝi en ĝia sidejo niajn laborkunsidojn.

En urbo kaj urbeto, kie loĝas sufiĉa nombro da samideanoj, ne eblis organizi la kunvenon. Per nepravaj motivoj kaj svagaj pretekstoj, la lokaj esperantistoj rifuzis preni sur sin la preparlaborojn.

Oni devas do reliefigi, ke en Caldas da Rainha, kie vivas apenaŭ du malnovaj gesamideanoj kaj grupeto da novbakitaj adeptoj de Esperanto, la plenumo de la iniciato estis prete akceptita.

Al la bona amiko Manuel José Pinguinha, la entrepreninto kaj motoro de la nunjara renkontiĝo, nian aplaŭdon kaj dankemon pro lia dinamismo, entuziasmo kaj fervoro.

La nomo de la samideanino Alsácia Pontes Machado ne povas esti forgesata. Talenta, delikata poetino de tre alta inspiro, ŝi pasie kulturas la Internacian Lingvon. De antaŭ longe, pionire, ŝi propagandas Esperanton. Bonvolu ricevi, sinjorino, ĉi tiun pruvon de admiro flanke de mi, kies sola merito, se meriton tion oni povas konsideri, estas mia antikveco en la movado.

Caldas, la benloko, kiun en la jaro 1485 la reĝino Leonora fondis, iom-post-iom ampleksiĝas kaj iĝis floranta urbo, la ĉarma kaj alloga scenejo de nia V kongreseto.

Tre bone naturdotita, Caldas da Rainha, riĉa je pitoreskaj ĉirkaŭaĵoj, kaj grava deponejo de artaj juveloj, estas vere rimarkinda centro. Bedaŭrinde, ne efike konatiĝas tiom da vidindaĵoj.

En Caldas troviĝas la tre antikva preĝejo "Nossa Senhora do Pópulo", eble la unua ekzemplero de la antaŭ-manuelina arkitektura stilo.

La Muzeo José Malhoa, kiu situas en la granda kaj ĝuinda urba parko, entenas en siaj dek ses salonoj artismajn trezorojn. Tie grupiĝas unu el la plej riĉaj kolektoj en Portugalio da ĉefverkoj de majstroj en la diversaj apartaj branĉoj de la belarto. En tiu tempo al belo dediĉita, oni povas kontempli kun admiro kaj ĝuo multegon da artaĵoj. Grandkvante tie ariĝas: pentraĵoj, desegnoj, skizoj, gravuraĵoj, skulpturoj, pecoj da ceramiko, medallionoj, stila meblaro kaj aliaj valoraj artverkoj.

José Vital Branco Malhoa, famkonata portugala pentristo, kaj Rafael Bordalo Pinheiro, verva karikaturisto, populara skulptisto kaj la plej ŝatata nacia ceramikisto, elstaris inter la plej eminentaj filoj de Caldas da Rainha.

La regiona ceramiko kreiĝis je la komenco

de la fondo de la pratempa vilaĝo. Estis en la XIX jarcento ke tiu populara arto disvolviĝis, unue dank'al la fabriko de Maria dos Cacos. Poste, en la jaroj 1853 kaj 1884, Manuel Gomes Mafra kaj Rafael Bordalo Pinheiro, respektive, instalas atelierojn. Tiu tradicia arto kaj la regionaj dolĉaĵoj estis la logiloj, kiuj plej konatigis la urbon kaj ankoraŭ hodiaŭ altiras vizitantojn. Ĝi estas la fono, la inda kadro, la bela ornama molduro de nia renkontiĝo.

Ne estas hazarde ke ni kunsidas en CASA DA CULTURA.

Sub la verda standardo de la paco, nia eduka movado konkeras la mondon, kunigas batalantojn. La Internacia Lingvo, kiun ni uzas, lernigas, kulturas kaj klopodas disvastiĝi, jaro post jaro perfektigas. Oni povas aserti, ke ĝi atingis gradon de lingva kaj lingvistika perfekteco. Esperanto fariĝis ne nur taŭga sed ankaŭ bonega instrumento de kultura esprimo.

La amplekso de nia movado, kiu etendiĝas tra la tuta mondo, ankoraŭ ne estas tre vasta. Kvankam limigita laŭ nombro de aktivaj praktikantoj, ĝi tamen estas supermezure granda koncerne la celo. Ĝia projekcio estonta ekzercos sendube bonvolan influon sur la rilatojn de la tuta homaro. La edukado, moroj kaj kondiĉoj de la homoj certe pliboniĝos.

Malgraŭ erarigaj konkludoj, kiuj indikas ŝajnigan regreson, Esperanto kontinue kreskas kaj certigas forton kaj kapablon por venki la kontraŭstaron de sensencaj oponentoj.

Pro manko de tempo mi ne povas resumi la edifan historion de Esperanto, paroli pri nia multvalora literaturo, elvoki la verkon kaj la moralan profilon de Zamenhof, skizi biografietojn de eminentuloj de nia humanisma movado.

Mi demandas: ĉu la mondo trapasas epokon de mensa, de spirita intensa krizo? Ĉu la literaturo, arta, intelekta kreiva nivelo de la homoj malprogresas? Ĉu la socio, kontraŭ la normala, natura marŝado antaŭen, nuntempe retournas? Ĉu la multaj konkeroj de la civilizacio post miljara penado finfine frakasos? Ĉu la

belaj songoj de l'homaro nepre neniĝos?

Konvinkite mi asertas, ke ni ne rajtas tion supozi. Certe ni vivas aparte gravan periodon de profundaj sociaj ŝanĝoj. Malfeliĉe, la nuntempa materia, scienca kaj teknika progreso, kiu fulme rapidas, ne estas akompanata de simile forta morala evoluado. Tio estas fakto delonge konstatebla.

Sendube, interne kaj eksterlande, la perspektivoj estas malbonaj. Ni travivas epokon de perturboj, komplikajoj, de profunda malordo en la socia korpo de la popoloj kaj nacioj.

(daŭrigota)



PENSEROJ

"Jules Verne* ofte esprimis sian entuziasmon pri la internacia lingvo kaj antaŭvidis brilan estontecon al Esperanto kaj al la esperantista ideo. Li projektis ankaŭ verki romanon, kie Esperanto ludus gravan lokon.

Kiel rakontas en lia biografio lia nevino Mme Allotte de la Fuye, li ofte ripetis, ke "la ŝlosilo de komuna lingvo, perdiĝinta en la Babelturo, povas esti refarita nur per la uzado de Esperanto.

(El radiparolado: "Verkistoj Amikoj de Esperanto - Jules Verne", Romo, la 20-an novembro 1964).

*Jules Verne, famkonata franca verkisto de fantaziaj romanoj.



"Enkonduko de la lingvo internacia ĵetas lumon novan je la problemo de la homa parolo kaj diverseco de la idiomoj. Nenia penso, nenia kompreno estos perdita."

El Marcel Prevost, konata verkisto, membro de la Franca Akademio.

(Eltiraĵoj el la verko: "Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj", aperinta en 1970).

NOTOJ PRI LA 37-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

La 37-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiun mi partoprenis, okazis en la kultura kaj industria urbo Sabadell, proksima al Barcelono.

Al ĝi ĉeestis proksimume 400 kongresantoj.

Sabadell havas la privilegion posedi gravan centron de Esperanto kaj la inaŭguro de la nova sidejo de "Centro de Esperanto Sabadell" dum la kongreso bone atestis pri tio.

La programo estis bona kaj varia kaj, malgraŭ kelkaj neindaj okazintaĵoj, sufiĉe kontentigis ĉiujn, ĉar ĝi enhavis bonajn fakojn: laboran, kulturen kaj distran.

La vizito al Esperanto-Muzeo en Sant Pau d' Ordal kaj la teatraĵo - Proksima Nekonato - prezentita de la geaktoroj de la Pola Esperanto-Teatro estis vere du allogaj punktoj de la kongreso.

Dum la vizito al Muzeo de Esperanto, okazis la solena momento de livero de la Medalo Klara Silbernika (edzino de Zamenhof), destinita premi neesperantistan edzinon de esperantisto kiu sukcesas per sia progresema karaktero kons tante venkociele apogi kaj helpi sian edzon en la Esperanto-Movado.

Mi ne povas ankaŭ forgesi la intervenon de la infana teatra grupo de Centro de Esperanto Sabadell kiu sukcese prenis la atenton de la kongresanoj dum la Arta Vespero, per tre gaja komedieto.

Post la kongresa oficiala fermo en la aŭditorio de la kongresejo la kongresanoj pli gaje fermis ĝin per la plej bona maniero, t.e. per la Oficiala Bankedo kie la kataluna poeto Gabriel Mora i Arana regalis la ĉeestantaron per lego de poemo de li verkita.

O. Almeida

XXXXXXXXXX

(fino)

Gravan lokon trovis Esperanto en la eduka sistemo por la junularo. Oni instruas Esperanton ĉiujare en kelkdeko da lernejoj kaj ankaŭ en kelkaj edukaj establejoj (ekz. t.n. Palacoj de Junularo en Varsovio kaj Ŝĉecin agas tre energie kaj efike) kaj vastprograme en junularaj E-rondoj. Ankaŭ la studenta organizaĵo SAPS (Socialisma Asocio de Polaj Studentoj) okupiĝas pri nia lingvo havante ĉ. 30 sciencajn E-rondojn ĉe altlernejoj kaj organizante ĉiujare kelkajn sciencajn seminariojn (ekz. studentoj de la Varsovia Universitato organizis en aprilo 77 jam la 5-an Studentan Interlingvistikan Seminarion dum kiu i.a. ankaŭ mi prelegis pri la temo "Frekvenco de la Leksemaj Kategorioj").

Tutapartan popularigadan rolon ludis kaj ludas diversaj afiŝoj, filmoj kaj antaŭ ĉio ekz. la 33 minuta filmo "Aby człowiek zrozumiał człowieka" (Por ke la homo komprenu homon) prezentita en la centra programo de la Pola Televido.

La Turisma Centro de PEA en Bydgoszcz (Bydgoŝĉ) aranĝas ĉiujare ekskursojn eksterlandajn kaj enlandajn laŭ tre abunda programo, internaciaj aviadil- aŭtobusaj karavanoj helpas al esperantistoj aranĝi renkontiĝojn kun iliaj kolegoj en diversaj landoj (ekz. Jugoslavio, Bulgario, Hungario, Ĉekoslovakio, GDR).

En Pollando nunjare okazos ekzemple la 2-a Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, la 3-a Montarmarŝado (tra Sanktakruca Montoĉeno), la 14-a Internacia Esperanto-Feriado "La Ora Pola Aŭtuno" kaj diversformaj ripozoj ĉe la lagoj kaj Balto, tendaroj por esperantista junularo.

Se temas pri internaciskalaj aranĝoj oni devas antaŭ ĉio mencii la okazintan 44-an UK en Varsovio (1959), TEJO-kongresojn aŭ studen-

tajn renkontiĝojn, diversspecajn renkontiĝojn
kaj seminariojn, kaj ĉijare polaj E-katolikoj
organizos la 37-an Kongreson de IKUE en Czes-
tochowa (legu: Ĉenstoŭova).

Walerian Wodarczyk
(Varsovio)



NIAJ POETOJ

Nia kara estinta Saldanha Carreira estis
gaja kaj bonhumora poeto, kiel pravas tiom da
poeziaĵoj, kiujn li verkis kaj el kiuj ni jam
publikigis kelkajn.

Sed el li oni povas diri ankaŭ, ke kiam li
skribis en prozo, li tion faris multfoje
poezie.

Por tion pruvi, kion ni ĉi supre asertas
ni publikigas prozaĵeton kiu aperis en 1948 en
"La Praktiko", sub la titolo "Abelaĵoj":

Ĉe truo de korka sidejo abela loĝanto
aperas.

Ĉielo tre nuba, malgaja mateno.

— Ĉu pluvas... ne pluvas...?

Maldekstren kaj dekstren la eta kapeto es-
ploras hezite.

— Malgrandaj, tiklemaj gutetoj signifas ne-
nion, — al si mem ĝi murmuris. — Kuraĝe an-
taŭen! — kaj ĝi zume forflugas.

Plej bonan vojaĝon, abelo!

La etaj, tre mildaj piedoj de la dolĉaj,
mielaj etuloj ĝojigas delire la florojn.

Ĉi tiuj ŝategas tremante la krurajn kare-
sojn, kaj tute sin donas, dorlotas la insek-
tojn, donacas la flavan polenon je pago de
l' kisoj.

De floro al floro flugetas la abelo, tien
kaj ĉi tien, antaŭen kaj reen, serĉeme ĝi flir-
tas en sia laboro.

Adiaŭ, abelo!

Vi jam tro dikigis polene la krurojn; al
hejmo reflugu, al via tavolo, riĉigi la ĉelon
miele!

Forflugu, abelo!

Kaj tra via vojo ĝis la abelejo, pri via
riĉaĵo vi zorgu!

Tre zorgu, abelo!

Vi devas vin gardi, neniam koleri, pro via
mortiga pikilo, pro via mortema pikilo.

Adiaŭ... adiaŭ...

Venteto kantigas abele la florajn kres-
kaĵojn.

La suno truigis la nubojn, kaj tra la lazura
pordego miloblaj radioj disflugas, similaj
al oraj, tre oraj abeloj.

TAGO DE ZAMENHOF

La estraro de PEA intencas kunigi la portu-
galajn geesperantistojn dum vespermanĝo, por
honorigi la naskiĝdaton de Zamenhof.

Tiu kunveno okazos la 15-an de Decembro, en
restoracio situanta en Lisbono, kun komenco je
la 8-a vespere.

La menuo estos libera, t.e. la partoprenan-
toj povos laŭvole elekti el la normala menuo
de la restoracio-servo.

Aliĝoj de interesataj partoprenontoj estos
akceptataj ĝis la 8-a de Decembro.

Ne forgesu! Aliĝu al tiu honorfesto kaj
sendu kiel eble plej frue vian jeson al PEA!
La aliĝo estas tute senpaga, vi pagos nur tion
kion vi konsumos!

DEZIRAS KORESPONDI

S-ro Rudolf Seifert
Frauenstein
postrestanta 11
DDR 9202

S-ro Rolf Heinz Richter
83 Pirna - Copitz
Karl-Buttner-Strass 5
DDR

S-ro Edward Koval
21-010 teczna
Rynek 3 m 17/9
Woj. Lublin
POLLANDO

F-ino Gunilla Sundholm
Spikevsgatan 278
S-724 74 Vasteras
SVEDIO

Algum tempo depois do aparecimento dos primeiros cadernos de divulgação da Língua Auxiliar Internacional assinados por um Sr. "Dr. Esperanto", quem por eles se interessou e começou a lê-los e a estudá-los breve se apercebeu de aquela Língua Auxiliar não era apenas um instrumento idiomático, para facilitar as relações humanas, sem conteúdo moral; era antes uma IDEIA com Amor lá dentro, destinada a estimular e dinamizar os anelos de Paz e Compreensão existentes em todos os homens, e uma mensagem sem fronteiras, um projecto de Boavontade, de Entendimento, de Concórdia e Cooperação, atirado ao mundo por meio de uma Língua Auxiliar, que mais cedo ou mais tarde todos haveriam e haverão de falar. Todos os trabalhos de Zamenhof em Esperanto e sobre o Esperanto, as suas cartas, os seus poemas - La Vojo, Preĝo Sub la Verda Standardo, La Espero, que viria a ser o hino esperantista - o confirmam. Esse fluido oculto e vivificador depressa se designou como "Interna Ideo". Mais tarde, sob o impulso do Primeiro Congresso, realizado em Bolonha, na França, convertida a ideia de Língua Auxiliar em Movimento Internacional, receberia o nome de Esperantismo. Os Esperantistas passariam a ser, assim, não só indivíduos capazes de falar uma língua universal, mas também adeptos de uma ideia universalista, de uma ética de Paz e Fraternidade, última meta, afinal, de todos os grandes filósofos, dos Profetas de todas as Religiões. Só que nenhum deles ofereceu aos homens uma língua que todos pudessem falar, pela qual todos pudessem entender-se, em todos os domínios do conhecimento humano.

No próximo mês de Julho completam-se 90 anos sobre o aparecimento em público dos primeiros livrinhos de ensino e aprendizagem do Esperanto e que apareceram em quatro línguas:

russo, polaco, alemão e francês, editados pelo Autor. O esforço foi grande. Propor ao mundo a adopção é o aprendizado de uma Língua neutra auxiliar era uma empresa extraordinária e arrojada, que só a fé de um grande Ideal poderia sustentar. As formas mais avançadas de comunicação que hoje nos enriquecem eram totalmente desconhecidas há 90 anos. O correio, os transportes marítimos e ferroviários, o livro e a Imprensa eram os meios de comunicação que existiam e que de forma bastante limitada punham os homens em contacto uns com os outros e com o mundo. Foi por isso, de certo, que o Esperanto tomou logo um incremento notável e os seus Congressos reuniam um número de participantes que aumentava de ano para ano. Uma língua universal, que todos os homens aprendessem e falassem, que aproximasse as nações do norte das do sul, que unisse o oriente e o ocidente, que facilitasse as relações internacionais na Literatura, na Técnica, nas Embaixadas, nos Congressos Científicos, era um deslumbramento para as mentes mais progressistas, para os espíritos mais idealistas...

Assim o Esperanto se propagou e cresceu em grande parte do mundo até à primeira Guerra Mundial. E como a Paz é para os povos como o Sol é para a Vida, quando ela falta tudo escurece e se anuvia, tudo pára, quando não recua ou se anula. O jovem Movimento Esperantista, em pleno desenvolvimento e florescência, foi envolvido em trevas e luto por essa tremenda conflagração internacional. Foram muitos os esperantistas das diversas nações em luta, que o fogo do entusiasmo engrandecia, que tombaram nos campos de batalha ou desapareceram nos mares. Na sua casa de Varsóvia o genial criador do Esperanto, sofria todas as angústias e desesperos de quem vê desmoronar-se à sua volta o edifício maravilhoso da Esperança e da Fraternidade que idealizara e construíra. Podemos dizer que Zamenhof, combatente da Paz e do Futuro, foi uma das vítimas dessa primeira Guerra que envolveu quase todos os continentes.

A interrupção forçada da vasta correspondência que mantinha com amigos de diversas nacionalidades, a falta de notícias ou notícias terríveis dos que se encontravam nas frentes de batalha, a destruição de todos os seus sonhos de paz e de amor entre os homens iam-no amarfanhando de angústia e desespero, da amargura profunda de quem conhece o quê é o porquê desse fenómeno social que é a guerra e a sua crueldade e nada pode fazer para evitá-lo. Noites de ansiedade, sem poder conciliar o sono, sucediam-se umas as outras. Foi numa dessas noites que escreveu aquela poesia de ânsia incontida, que havia de divulgar-se entre todos os esperantistas, e que recebeu o título das próprias palavras que nela se intercalam repetidamente:

"Ho, mia kor'."

(daŭrigota)



PLIBONA MONDO DANK'AL ESPERANTO. AŬ DANK'AL
LA ESPERANTISTOJ?

Se vi konsideras Esperanton nur kiel intere san filologian donitaĵon, vi tuj ĉesu la le gadon.

Sed supozeble ankaŭ vi iel kliniĝas al la "interna ideo" kaj apartenas al la granda plimulto, kiu konsideras Esperanton kiel personan kontribuen al la paco, al pli bona interkompreniĝo inter la popoloj, al pliriĉigo de sia personeco....

Por vi kaj mi, kiuj aktivis en la movado, estas malagrablege konstati, ke tiu ĉi movado ne progresas pli rapide: se la avantaĝoj de Esperanto estus tiel evidentaj, la uzo de tiu ĉi lingvo devus nekontraŭstareble plivastiĝi. Sed kompreneble ni devas fronti muron de antaŭjuĝoj. Tamen, dum la lastaj jardekoj, oni povas konstati ĉie pli da malfermiteco rilate la mondajn problemojn. Al mi ŝajnas ankaŭ ke, koncerne Esperanton, oni renkontas malpli da rezisto, ridindigo kaj antaŭjuĝoj. Kaj tamen tio ne rezultigas spektaklan kreskon de la nombro

da gelernantoj.

Finfine mi konkludis ke ni, Esperantistoj, nebone defendas nian starpunkton.

En nia movado, mi renkontis jam tiom da homoj ege kompleksitaj, antaŭjuĝantemaj kaj time maj por malfermi siajn orelojn rilate al la starpunkto de aliuloj. Tial leviĝis ĉe mi la demando: kio okazos estontece, se ĝuste tiaj homoj estas la pioniroj de la monda paco, de kompreniĝo inter ĉiuj popoloj?

Ĝis antaŭ preskaŭ du jaroj, tiu problemĉeno ŝajnis por mi senelira: Esperanto tro malrapide progresas, ĉar plej multaj homoj havas antaŭjuĝojn rilate tiun ĉi solvon de la lingva problemo. Kaj tiuj, kiuj pretas lerni la lingvon ofte estas mallargŝpritaj rilate aron da aliaj problemoj.

Antaŭ preskaŭ du jaroj, mi konatiĝis kun la Transcendenta Meditado-Tekniko, simpla kaj sen pena metodo por forigi streĉitecon, kies rezultojn oni senĉese science sekvas.

Kelkajn monatojn poste, kiam mi estis venkinta mian dubon, mi - ankoraŭ skeptike - komencis meditati laŭ tiu ĉi metodo (2 foje ĉiutage po 20 minutoj). Sed montriĝis ke mi konatiĝis kun mirinda ebleco por rompi la seneliran cirklon, kiun mi ĉi supre priskribis. Mi spertis, ke - en mallonga tempo - eblas liberiĝi de aro da kompleksoj, inhibicioj kaj streĉiteco. Mi rimarkis ke, dank'al tiu ĉi tekniko, mi pli malferme prijuĝas aliajn personojn, kies konduton antaŭe indignis aŭ eĉ kolerigis min.

La Transcendenta Meditado-Tekniko grave ŝanĝis mian vivon. Depost mia konatiĝo kun ĝi, mi farigis pli trankvila kaj memfida. Oni diras ke mi faras pli multe, kvankam mi ŝajne disponas pri same multe da libera tempo. Ankaŭ el fizika starpunkto, multo ŝanĝiĝis. Mi estas pli gaja kaj malpli laca.

Hieraŭ, mia edzino, kiu feliĉe havas bonan memoron, rimarkis ke dum la lastaj monatoj, mi vive povas rakonti pri aferoj, kiujn mi antaŭe ŝajne estis forgesinta.

Sed en tiu ĉi artikolo mi devas resti kon-

ciza. Cetere miaj ĝisnunaj spertoj ŝajnas esti nur la komenco de nova vivmaniero. Intertempe, jam pli ol 10 gemembroj el nia Esperanto-klubo komencis apliki tiun ĉi teknikon, kaj preskaŭ ĉiuj estas entuziasmaj.

Eble ankaŭ vi interesiĝas pri tiu ĉi rimarkinda fenomeno. Multaj Transcendenta-Meditado-centroj ekzistas tra la tuta mondo, kaj verŝajne ankaŭ vi trovos iun en via ĉirkaŭaĵo.

Mi povas varme konsili al ĉiu leganto por fari tion (pli bone kun iom da malfido ol kun blinda entuziasmo), ĉar la TM-tekniko estas tu te neŭtrala, kaj povas komplete harmonii kun ia ajn filozofia, politika, socia kaj religia kenvinko.

Se viaj spertoj estos same interesaj kiel tiuj de miaj amikoj kaj de mi en Antwerpen, tio nur povos prosperigi nian movadon.

.... Kaj eble ekestos ĉi rilate nova Fak-grupo....

Ivo DURWAELE



NIAJ LEGAĴOJ

Se vi deziras aboni esperantan gazeton, PEA estas la peranto de la ĉi-sube listigitaj legindaj magazinoj kaj bultenoj, laŭ kondiĉoj kaj prezoj indikitaj:

Nomo	Daŭro	Prezo
PACO	1 jaro	150\$00
OOMOTO	1 jaro	250\$00
SCIENCA REVUO	1 jaro	250\$00
LA ESPERO	1 jaro	330\$00
EL POPOLA ĈINIO	1 jaro	90\$00
-"-	2 jaroj	120\$00
-"-	3 jaroj	150\$00
MONDA KARUSELO	4 numeroj	100\$00
HEROLDO DE ESPERANTO	1 jaro	450\$00
REVISTA PORTUGUESA		
DE ESPERANTO	1 jaro	100\$00
NIA BULTENO	1 jaro	70\$00

La somero de 1903 trovas ŝin en Chemnitz prilaboranta la teksproletojn, kiuj avidis aŭdi ŝin en sufokaj plenplenaj ĉambregoj aŭ en vastaj mitingoj por la parlamenta baloto.

Post malgrandaj ferioj, Roza reprenis sian aktivecon tra tuta Eŭropo. En socialista kongreso (Amsterdamo) la gvidantoj ĉirkaŭbrakas unu la alian. La plej influhavaj politikuloj de la Internacio: Roza, Guesde, Adler, van der Veld, Plekanov, Ferri, Hyndman partoprenis en turniro de politika kaj spirita vervo, kiu tra kuris tiun Kongreson. La idealo estas la kunfandiĝo de la internacia proletaro en unu sola unuiĝo. Roza ĝojas pro la videbla sukceso de la Amsterdama Kongreso. Ĵaŭres rezignis sian tro parlamentismon kaj la dekstra tendenco ŝajnas momente venkita. Venis poste iom da distro. Ŝi sentas sin feliĉa. Sur la rivero la flagornamitaj boatoj veturas sub helsunaj radioj; la francaj delegitoj dancadis la karmanjolon; ŝi gaje parolas kaj ridas kontenta pasante tra la stratoj de la Urbo. Tiuj, kiuj vidis ŝin en tia animstato kaj travidebla bonkoreco, certe ne kredis la burĝajn ĵurnalistojn, kiuj ofte nomis ŝin la "sangavida Roza".

En la aŭtuno de tiu sama jaro ŝi eniris en malliberejon; ŝi ofendis la reĝon de Saksio. Dum sia kaptiteco, ŝi skribas kortuŝajn leterojn al siaj amikoj Kautsky, ŝi priskribas la rememorojn de antaŭaj bataloj kaj ĝojoj de triumfoj, sed ŝi suferas pro la interrompo de sia necesa laboro.

Kelkajn semajnojn pli frue ol atendite la pordo de la malliberejo malfermiĝas. La nova reĝo proklamis amnestion. Roza ne akceptis volonte tian gracon; ŝi protestis, sed neniu aŭdis tiujn protestojn kaj Roza revenas en liberecon kun iom da indigno.

AMUZA FAKO

SILAB-ENIGMO

BI BO BO BRA BRE BRI ĈI DA DI DI DRA DRI ES
FAJ FI PRO PRO GAM GLA GLA GLA GLA GO GRO ĜAS
KAK KAS KO KO KO KO KO KO KO KO KOM KON KOR
KOV KRE KRO KU LAK LAM LAR MIL MO MO MO MOR MU
NO NO NO PAS PI PIL PIN PLO PO PRA PRO RI RI
SO TO TO TO TO TO TRI TRO TRO TRO VO

El la supraj 76 silaboj formu 38 dusilabajn kaj kvinliterajn vortojn kun jenaj signifoj:

1-Infantrinkaĵo. 2-Konstruŝtono. 3-Supra korpo parto. 4-Lumigilo. 5-Pikanta kreskaĵo. 6-San-gon soifanta objekto. 7-Ĉefo. 8-Verŝi larmojn. 9-Estigi akutan sonon tra lipoj. 10-Interborda veturilo. 11-Ordigi la harojn. 12-Granda kesto. 13-Reĝa seĝo. 14-Vivofino. 15-Malsupra korpo-parto. 16-Glatigi tukojn. 17-Marbesta dometo. 18-Blekas kiel bovo. 19-Grupiĝo de kelkaj familioj. 20-Kapŝirmilo. 21-Sekreta skribsignaro. 22-Besta manĝujo. 23-Botelŝtopilo. 24-Spicaĵo. 25-Lakta supraĵo. 26-Malsovaĝa. 27-Kverka frukto. 28-Fari vestojn. 29-Reĝa surkapajo. 30-Parto de la stelo. 30-Kulturi bestojn. 32-Igi nevidebla. 33-Trinkilo. 34-Ludilo. 35-Interesa kaverno. 36-Monato. 37-Teatra verko. 38-Festo.

La mezaj literoj de la vortoj formas Zamenhofan proverbon.

SOLVO DE ANTŬA NUMERO

Estis nur 8 la ĉeestantoj, kiuj tute ne kantis ĥore la de la aliaj kantitajn kanzonojn.



ŜANGŬO EN NIA ADRESO

Ni atentigas ĉiujn skribontojn al la Asocio, ke la adreso estas ŝanĝita jene:

Rua Dr. João Couto, 6, r/c-A

Lisboa-4

NIAJ KURSOJ

No próximo mês de Outubro iniciar-se-ão cursos elementares de Esperanto nos seguintes locais:

Sociedade de Língua Portuguesa

Sociedade Promotora de Educação Popular.

Para ambos os cursos estão abertas as respectivas inscrições na Associação Portuguesa de Esperanto, para onde devem ser remetidos quaisquer pedidos de esclarecimento.

Perfektigan kurson de Esperanto oni intensigas gvidi, kun komenco en Oktobro.

Oni akceptas aliĝojn de interesataj gesamideanoj.

La proksiman Oktobron komencos elementa kurso de Esperanto gvidota de S-ano Santos Ferreira en la nacia entrepreno Imprensa Nacional.

La partoprenontoj de tiu kurso estas membroj de la loka Grupo Desportivo e Recreativo do Pessoal da Imprensa Nacional.

KUNVENOJ DE ESPERANTISTOJ

Ni informas nian samideanaron, ke en Sociedade da Língua Portuguesa okazas, ĉiuĵaŭde, de la 6.30-a ĝis 8.00-a h posttagmeze en la tiea Esperanta Sekcio, kunvenoj de esperantistoj.

Aperu ĉiam!

Ankaŭ en la sidejo de PEA, se vi tion deziras, vi povos ariĝi laŭ jena kalendaro:

-unuajn kaj triajn sabatojn de ĉiu monato de la 4-a ĝis la 7-a h posttagmeze;

-ĉiujn merkredojn, de la 9-a ĝis la 11-a h posttagmeze.

Director:

D. Olga Serra Marques de Almeida

Propriedade de:

Associação Portuguesa de

Redacção e Administração:

Rua Dr. João Couto, 6 r/c -A - Lisboa 4

Composto e impresso:

Furtado & Saldanha, Lda.

Rua Capitão - Mor Pedro

Texeira, 5 - A Lisboa 3

BIMENSAL